

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 2 2011

Vendredon la unuan de aprilo

59a jaro

Kalendaro

(Ni komencas je la 19a horo. Kie? / *Hvor?* – vd. malsupre / *se nederst*)

Lundon la 4an de aprilo (semajno / uke 14) – *mandag*

Otto Prytz: "Ĉu blindulo vojaĝu kun aŭ sen akompano?". Prelegeto kaj diskuto.

Otto Prytz: "Bør en blind reise med eller uten ledsager?" Kort foredrag med etterfølgende diskusjon.

Mardon la 5an de aprilo (semajno / uke 14) – *tirsdag*

Kunhelpa ordigado/ purigado. Vd. p.3

DUGNAD se s. 3.

Lundon la 18an de aprilo (semajno / uke 16) – *mandag*

La antaŭpaska lundo. Kunveno sen fiksisita temo.

Mandag før påske. Møte uten bestemt tema.

Lundon la 2an de majo (semajno / uke 18) – *mandag*

Diskuto: Ĉu doni monon al sur-trotuaraj almozpetantoj en Oslo?

Diskusjon: Skal vi gi penger til tyggere på Oslos fortauer?

Lundon la 16an de majo (semajno / uke 20) – *mandag*

Diskuto: Ĉu butikoj estu malfermaj dimanĉe?

Diskusjon: Bør butikkene være åpne på søndager?

Lundon la 6an de junio (semajno / uke 23) – *mandag*

Ni priparolos la temojn de la landa kunveno en Tromsø fine de la semajno.

Vi snakker om sakene til landsmøtet i Tromsø følgende helg.

Lundon la 20an de junio (semajno / uke 25) – *mandag*

Eksurso al Skedsmo. Promeno al lokaj kulturaj memoraĵoj. Detaloj poste.

Kulturminnevandring i Skedsmo. Detaljer fås senere fra kontoret.

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (tramo) laŭ la samnoma strato.

OkazIS

Ĵaŭdon la 27an de januaro.

Kromkunveno okaze de la centjariĝo de NEL. I.a. ni voĉlegis pri la celebrado de la 50-jariĝo antaŭ 50 jaroj, kiam la urbestro Brynjulf Bull paroladis al la festkunveno en Esperanto!

Lundon la 7an de februaro.

Cato Haugen prezentis ĉefajn faktojn el la historio de la sameoj kaj ties lingvoj.

Lundon la 21an de februaro

La tago de la gepatra lingvo: Otto Prytz donis ekzemplojn kiuj montras

influan de gepatra lingvo sur la elparolo kaj vortuzo de uzantoj de Esperanto.

Lundon la 21an de marto

Kiel lingve lertiĝi? Tio estis la temo. Ni diskutis precipe pri la parola flanko de la afero: la bezono de komencanto multe aŭskulti kaj la bezono de pli sperta parolanto akiri internacian elparolon. Por ambaŭ troviĝas bonaj diskoj – kiel suplemento al partopreno en internaciaj medioj.

DD

Jarkunveno / Årsmøte, lundon / *mandag* 7. marto

Konciza raporto

La jarraporton 2010 ni aprobis post unu redakta ĝustigeto ("Informprelego Lige kun la Zamenhofa jubileo decembre de 2009 ...")

La jarkalkulon 2010 ni aprobis, kondiĉe ke la revizoro ne havos rimarkigojn.

La du proponojn de Cato Haugen – pri elekto de domkomisionano kun anstataŭanto kaj pri la nombro de membroj de la elekta komisiono – ni malakceptis.

La iniciato elekti novan kaj pli junan estraron ne sukcesis, pro nesufiĉo da junaj kandidatoj. Ni ankaŭ ne sukcesis trovi kandidaton por la posteno de vicprezidanto.

La estraro 2011-2012 konsistas el

Prez.: Kjell Peder Hoff (reelekto)

Vicprez.: [vakas]

Sek. korespondanta: Douglas Draper (reelekto)

Sek. raportanta: Ida Brenna (reelekto)

Kasisto: Harald Rygg (reelekto)

Estrarano: Kristoffer Haug (nova)

Anstataŭantoj:

1. Otto Prytz (reelekto; pretas partopreni en la estraro kiam ĝi alie ne estus decidpova)

2. Birgit Solberg (nova)

Revizoro: Terje Meier (reelekto)

anstataŭanto: [vakas]

Elekta komisiono:

Otto Prytz kaj Leif Arne Storset.

Dugnad

komuna ordigado / purigado

Finfine venis la printempo kaj tempas purigi nian ejon.

Vårrengjøring. Mardon 5 aprilo 18-21. Verŝajne iuj komencos jam pli frue (eĉ matene), do eblas veni dumtage se tio konvenos al vi.

Tirsdag 5. april 18-21, men kom gjerne tidligere på dagen hvis det passer.

Ni bezonas helpon ankaŭ formanĝi la multajn fruktojn – pomojn, bananojn kaj eĉ avokadojn – kiuj restas post la lasta gasto!

Fondaĵo Kjell kaj Aase Gustavsen

Ni memorigas pri la kluba fondaĵo Gustavsen. Ĝi estis starigita en 2004 per donaco de Kjell (1915–99) kaj Aase Gustavsen por subvencii junularan aktivadon – precipe vojaĝojn por serĉi inspiron ĉe la movado en eksterlando, sed ankaŭ alian agadon el kiu povas profiti la Oslo-kluba junularo. Petskribojn akceptas la kluba estraro (per la oficejo adreso <oficejo [a] esperanto.no>).

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – *leie møterom?*

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

UK-afiŝo: Ĉu vi povas ie pendigi?

Ni havas plurajn grandajn (A2-) afiŝojn pri la kopenhaga kongreso (aera foto de Kopenhago).

T-ĉemizoj el Pollando

Komence de julio Kjell Peder Hoff havos T-ĉemizojn kun verda teksto *Vi snakker esperanto. Gjør du?* Li vendos ilin por 100 kronoj.

Postkongreso en Oslo 2011

Kelkaj klubanoj planas tri-tagan turisman aranĝon en Oslo post la Universala Kongreso en Kopenhago venontjare. Se vi interesiĝas helpi, bv. turni vin al Cato Haugen <pluto8008 [a] gmail.com> poŝtlf. 452 88 435.

Nova libro de Lars Forsman

Esperanto ... 50 miljoner träffar

La novan libron de Lars Forsman (vd. *Norvega Esperantisto* 6/2010, dorsan paĝon) pri lia 18-jara sperto kiel instruisto pri Esperanto en la popola altlernejo de Karlskoga, **vendas nia klubo por 95 kronoj.**

Den nye boken til Lars Forsman (se Norvega Esperantisto 6/2010, baksiden) om hans 18 års erfaringer som lærer i esperanto på Karlskoga folkehøyskole, er til salgs i klubben for 95 kroner.

La verko baziĝas sur propraj praktikaj spertoj de la aŭtoro. Li profunde konas la temon. Ĝuste la prezentmaniero faras la libron tre alloga. Leganto ne emas lasi talentan akompanon de Lars Forsman, kiu vokas al vigla kaj verva rakontado pri la lingvo mem, ĝia instruado kaj utiligado en tutmondaj kadroj.

Jorma Ahomäki ĉe edukado.net

Ni vendas librojn, insignojn, glumarkojn

Krom libroj (lernolibroj, vortaroj, literaturo) nia klubo vendas i.a. ruĝajn glumarkojn (4 x 7 cm), por valizo, (dorso)sako, teko po 2 kronoj; kaj diversajn insignojn / *jakkemerker* (verda stelo).

Ankaŭ (svedajn) kun verda stelo kaj la vorto "Esperanto" kaj en parolveziko. (Videblas interrete ĉe esperanto.se).

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: <oficejo [a] esperanto.no>
Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).